

# esperantouSA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1990(7)

## Making News This Issue

### Book-Service Retrospective

Central Office Vice-Director Ionel Onet discusses the operation of the Book Service and looks at some of its top-selling items in this issue's "El la Centra Oficejo."

See Page 5

### Regional Conferences

In recent years, more and more areas in the United States are holding regional Esperanto conferences. This issue we look at reports from the Midwest, the Rocky Mountains, Washington DC and the Pacific Northwest.

See Pages 7-9

### Specialized Dictionaries

One of Esperanto's more apparent needs is for more dictionaries for specialists in science and technology. In this issue's review section, the editor looks at five such dictionaries for physicists, mathematicians and computer scientists.

See Page 13

### In This Issue :

Language In the News 6

Esperanto, Science and Technology 9

Using Esperanto for World Travel in 1991 16

And Much, Much More to  
Delight and Inform You!

## Opinion

# Directions for Esperanto

by Grover C. Allred

[ELNA member Grover C. Allred sent me the following long letter in reaction to recent articles by Doug Portmann and Anna Löwenstein with some suggestions about the development of Esperanto. Since he raises questions that are often in the minds of new—and sometimes even long-time—Esperantists, I am taking the liberty of publishing his letter as an article, adding what I consider an appropriate title. Some editorial comments follow Mr. Allred's article.]

I read the articles by Doug Portmann (ELNA Newsletters #6, 1989 and #7, 1989) and the one by Anna Löwenstein (ELNA Newsletter #4, 1990) with a great deal of intellectual interest. I look forward to the publication of Peter Benson's *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (CEED). But of much more immediate significance is the commentary on the CEED by Portmann and the rather spirited rejoinder by Löwenstein. This suggests to me that Esperanto is a living

(Continued on page 3)

Our goal for 1991 1150


ELNA membership 1990 1031

ELNA membership 1989 931

ELNA membership 1988 778

ELNA membership 1987 572

Membership 730 on  
January 15!



# EDITORIAL

## FAILURE

### NO RESPECT FOR CHRISTIANITY

RIYADH, Saudi Arabia (UPI)—Christianity, an artificial religion intended to bring people closer together and promote world harmony, is having problems getting any attention.

Four speakers were on hand for a seminar on Christianity at the Pan-Arabic Modern Religions Association's annual convention here—but no one showed up to listen to them.

Fahd al-Mani of the University of Medina delivered a spirited defense of Christianity.

"Christianity does have an ideology. It is the wish for harmony on a religious basis," said al-Mani, 61, a professor of Buddhism.

The League of Arabian Christians says about one billion people practice Christianity worldwide, including about 500 in Arabia.

"There are probably no more than ten or twenty Christians in Medina and Mecca combined," al-Mani said Saturday. "Frankly, I'm disillusioned."

Christianity is based on Syriac religions, with elements eclectically derived from Judaism, Zoroastrianism and Mithraism. Example: Christians eat flesh and drink blood.

The religion was invented about two thousand years ago by one Yeshua bar-Yussuf, a Jewish carpenter from Nazareth near the Israeli-Jordanian border. Seeing corruption and violence within Judaism, he thought a new religion might be a key to world peace.

Actually this article isn't too far out—for a country where more than 300,000 American soldiers had to keep a low profile over Christmas in order not to offend their host government. It would never, of course, appear in the American press without extensive modification to make it fit the facts. At least, the facts as they are seen from outside the meeting rooms of the Pan-Arabic Modern Religions Association...

Nor is the article totally fictitious. Sub-

stitute the word "Esperanto" for "Christianity" and make other appropriate emendations, and you will have a pretty good reproduction of an Associated Press article that has been making the rounds of American newspapers since the annual meeting of the Modern Languages Association in Chicago this winter.

The author of the article, a lady from the *Chicago Tribune*, apparently found it amusing—and universally typical—that a presentation on topics having to do with Esperanto at the MLA convention attracted no listeners. This is not too unusual, based on my own limited experience; a similar presentation at an MLA convention in San Francisco several years ago attracted two listeners, both Esperantists. Now this may prove something about MLA members, but not necessarily about Esperanto; if I remember correctly, the conference in question occurred either in 1986, when I also attended the World Esperanto Congress in China, the largest international conference of any kind ever held in that country, or in 1987, when 6000 people visited the World Esperanto Congress in Poland. Neither of these latter events were mentioned in the American press, at least not to the extent that this non-event at the MLA conference was. Perhaps they, too, proved something—the wrong something.

In the above article, Prof. Fahd al-Mani is a religious *doppelganger* of Pierre Ullman, Professor of Spanish and Portuguese at the University of Wisconsin-Milwaukee, a long-time Esperantist and ELNA member whose reviews of Esperanto translations of Iberian literature can occasionally be found in the pages of *Literatura Foiro*. I spoke with Prof. Ullman on the phone about the article. He is apparently not unhappy with it—it has, he told me, attracted several requests for information about Esperanto and interviews on public radio—but he did state that the author had misrepresented or failed to present all the facts, and had occasionally misquoted him. Two persons, rather than no one, listened to the presentations at the seminar (one was the article's author). Prof. Ullman professed disappointment at the small turnout for the seminar; the article converted this into a profession of disillusionment about Espe-

ranto. The Esperanto seminar was scheduled by the MLA powers-that-be for early Sunday morning, a time when it would be difficult to get people to attend a love-in; this was not mentioned in the article. The article quotes Prof. Ullman as stating that "there are only six or seven Esperantists in all of Wisconsin," when Prof. Ullman is certainly well aware of the fact that there are at least twenty ELNA members in the state, not counting unaffiliated Esperantists. A purported example of Esperanto is half in bad Esperanto and half in bad Latin; it certainly did not come from Prof. Ullman, whose command of Esperanto is impressive.

(Additional note on this last point: some twelve years ago, another wire-service article about Esperanto presented a lengthy example of the language stated to be from the *Esperanto Bible*. The quote was entirely in Spanish.)

Several issues ago I wrote about such articles and how Esperantists ought to react to them. Several appear to be doing so. One copy I received had a letter attached to it; the author wrote: "I called the editor who was responsible for placing the article and who admitted never having read the article nor having any knowledge about Esperanto."

Bad advertising about Esperanto is in some ways better than no advertising at all. But it does give us an opportunity for producing a little good advertising.

This issue of *Esperanto U.S.A.*, the last for 1990, is a month late. The reason for this is sickness in the family—namely, my own. I apologize for the delay and hope—but do not promise—that it will not happen again.

It does give me the opportunity for a late, but certainly not too late, reminder. Namely: if you have not renewed your ELNA membership for 1991, this is the last issue of *Esperanto U.S.A.* that you will receive. If you have not paid your membership but want to go on receiving *Esperanto U.S.A.*, please send your dues to the Central Office as soon as possible. Issue 1991/1 will be appearing in about a month, and we wouldn't want you to miss it.

Don Harlow

# NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

The *Chapter 122 News* of the American Association of Retired Persons (September 6, 1990) includes an article by Roy Lott describing Esperanto and telling the reader how to obtain the first lesson in the ten-lesson free postal course. (sent by Roy Lott)

Esperanto is described as a "Language of the World" by Janice Hoke in the *Reno, NV Gazette-Journal* (Sep. 25, 1990). This four-column article, largely consisting of an interview with Reno Esperantist Natalie Sera, describes Esperanto's history, its value in the modern world, and its construction. It also includes a sidebar explaining where to learn Esperanto, either through NICE (Nevada Inform-Centro pri Esperanto) or ELNA. (sent by NICE and Gene Barratt)

In an article about Scituitate Citizen of the Year Gil Wilder, Alison Cohen of the Scituitate, MA, *Mariner* (Sep. 27, 1990) describes Wilder's interest in Esperanto, how he first learned about the language

forty years ago and learned it four or five years ago through the San Francisco State University summer courses. (from Gil Wilder)

Esperanto is "Easy Speaking" says Los Angeles, CA, *Times* (Oct. 25, 1990) writer Robyn Loewenthal in a full-page article with that title. The article discusses Esperanto and the Esperanto experiences of three local Esperantists: Prof. James Fonseca and Prof. Myron Bondelid of California Lutheran University; and long-time Esperantist Elwin Reed. A sidebar gives addresses for the Ventura County Esperanto Association, the American Association of Teachers of Esperanto, and the San Francisco State University summer courses. (sent by H. Elwin Reed)

"Prenda Cook loves the Valley—and language," according to "Spotlight on Today's Woman," a magazine insert included with the Harlingen, TX, *Valley Morning Star* (Oct. 28, 1990). This article, about ELNA Executive Board member

Prenda Cook's life and activities in Odessa and Harlingen, Texas, also discusses her work in the Esperanto movement and mentions the forthcoming ten-week course in the Harlingen Public Library. (sent by Prenda Cook)

Elizabeth Mayes states that "Esperanto Still Means Hope" in the *New York, NY, Westsider* (Nov. 8-14, 1990). Ms Mayes tells about Esperanto's history and compares the facility of learning the language with the difficulties of more standard languages. The article quotes from Dr. Julius Manson and Leonard Dzelzitis, who teach Esperanto courses at Stuyvesant Adult Center.

The magazine *Transitions Abroad: The Guide to Learning, Living, and Working Overseas*, in a column on "Socially Responsible Travel" by Dianne Brause, lists ELNA with its address and phone number, adding that "various clubs, schools, conferences, and Esperanto-traveling opportunities are available through this network."

(Continued from page 1)

language with all the questions and problems of any other living language.

With this in mind I would like to make a few comments about the living nature of Esperanto and living languages in general. These opinions are my own, and I am accountable for them.

Those who are acquainted with one or more living languages or with the study of languages in general are well aware of the fact that living languages change and adapt to the needs of those who use them. English is a good example; it is notorious for variations, flexibility, and adaptability. Yet with all of this, English has a core of "standardization" that makes it comprehensible across all borders.

The articles that I have indicated above suggest that some people have *really* come to see Esperanto as a living language. *If we accept, in a fully practical way, that Esperanto is a living language, then we must accept the fact that it is subject to all the pressures that impinge*

*on any other living language.* This has extremely important implications for the users of Esperanto. Many of them will no longer be able to look on the mythology of Esperanto as *writ final* from some divine revelation. May all of us be able to accept these implications gracefully.

We must recognize that there are various communities of users of a living language. Some feel needs that others do not feel. Esperanto users of all shades of ideology must eventually develop a tolerance for the idea that those who use the language are ones who own the language. This would be a sign of maturity.

The articles I have referred to above are the kinds of leaven a healthy, living language needs to stimulate adaptation to broader needs and desires. Tradition should and must carry weight, but it is never the final word. My length of life, experience, and intellectual pursuits will not permit me to believe that tradition in and of itself has the final say. For all forms that do not or cannot adapt, extinc-

tion is the end. About 99% of all living forms that have ever existed are now extinct. Their debris is well recorded. Almost the same can be said for languages on which we have records. Those on which we have no records must far exceed those on record. We are conscious of these facts today, therefore we can act from knowledge.

Now is the time for the users of Esperanto to take charge of their language in such a way that it does not become locked into some rigid form that will hear of no change. *Perhaps* a very wide based academy or committee would be useful. It would not be able to *dictate*, but it would *evaluate* and *recommend* on the basis of discussion, experience, and need. The membership would be broad enough to encompass representatives of all types of users, and no member would have a lifetime tenure. The evaluations and recommendations would be published

(Continued on page 10)



# REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

## CALIFORNIA

La 27an de oktobro ĉe Universitato Stanford en Palo Alto la nordkaliforniaj esperantistoj ekspoziciis ĉe la duonjara konferenco de la Fremd-Lingva Asocio de Norda Kalifornio (FLANC). La ekspozicio-tablon prizorgis prof-ino Ĉien Minĉi, Don Harlow, Ionel Onet, kaj Ed Williger.

La Esperanto-Asocio de Los Angeles kune kun la Losanĝelesa Kantona Komisio pri Interhomaj Rilatoj festis oktobron, 1990, kiel Monaton de Kultura Diverseco. Tiu pluretna festeno proponis pli ol 75 ekspoziciojn kaj programojn en la losanĝelesa regiono. Marianne Lee aranĝis, ke Esperanto estu unu el la ekspozicioj kaj aranĝis montri ĝin ĉe la Unua Unia Metodista Centro en centra Los Angeles. Marianne respondis multajn telefonajn demandojn, kaj pri Esperanto estis atentigitaj ĉiuj, kiuj partoprenis la observon de Kultura Diverseco.

EALA *Novajletero* Novembro 1990

La 16-18an de novembro okazis la 11a Nordkalifornia Senkrokodiliga Semajnfino ĉe la YMCA, Point Bonita. Partoprenis proks. 20 homoj. Prelegantoj estis i.a.: Prof-ino Ĉien Minĉi de Orient-Ĉinia Normala Universitato, pri la stato de la Esperanto-movado en Ĉinio; Reginald Jaderstrom pri du tradukoj (tiuj de Kalocsay kaj Peterlongo) de Dante; Ionel Onet, pri la nuna situacio en Rumanio (kun diapozitivaj); kaj Terence Geoghegan, pri siaj premiitaj infraruĝaj artfotadoj.

## MISSOURI

En Hannibal, Missouri, baldaŭ remalfirmiĝos la restaŭrita hejmo de Mark Twain kiel la Muzeo Mark Twain. En sia kolekto de Twainajoj, la Muzeo nun posedas ekzempleron de la komiksa versio de *Tom Sawyer* en Esperanto, eldonita antaŭ dek jaroj de la Hungara Esperanto-Asocio. Tio estas laŭ iniciato de Prof. Ron Glossop.

Raportis Ron Glossop

## NEBRASKA

La 24an kaj 25an de aŭgusto, NIA partoprenis en la Somera Instituto pri UNO per ekspozicio-tablo. Proksimume 100 junuloj kaj plenkreskuloj partoprenis la Instituton, kaj multaj vizitis la NIA-ekspozicion

NIA *Novajletero* #8

Novaj funkciuloj de la NIA, elektitaj en septembro, estas: Scott Ferguson (Prezidanto), Emilie Clements (Vicprezidanto), Larry Gregg (Kasisto), June Fritz (Sekretario), kaj Anne White (publico). La nova

prezidanto estas en la kvara jaro ĉe la Mezlemejo Nebraska City.

NIA *Novajletero* #8

NIA-anoj David kaj Emilie Clements kaj June Fritz partoprenis Stud-Konferencon pri la Tria Mondo en Omaha je la 4a ĝis la 6a de oktobro. La unuan tagon June petis kaj ricevis permeson starigi Esperantan ekspozicion. En la ekspozicio estis flugfolioj kaj de NIA kaj de ELNA.

NIA *Novajletero* #8

La Esperanta Semajnfino en Nebraska City je la 13a-14a de oktobro estis memorinda okazaĵo. Infanoj kaj plenkreskuloj same ĝuis konatiĝi unu kun la ceteraj. Ĉiuj ĝuis la bongustajn manĝaĵojn pretigitajn de la gastigantoj, la Esperanto-ludojn, kaj la Esperanto-kunkantadon. La venontjara Esperanta Semajnfino estas provizore planita por la urbo Lincoln je la dua semajnfino en oktobro.

NIA *Novajletero* #8

Kelkaj esperantistoj ĉeestis bankedon por la Tago de UNO en Lincoln je la 21a de oktobro. Tie la bankedestro petis ilin gvidi kunkantadon en Esperanto. Kantojn pretigis Larry Gregg, Anne White kaj David Clements, kaj June Fritz akompanis per la ĉina akordiono. Ĉiu el la 180 ĉeestantoj ricevis ekzempleron de la Esperantlingva versio de la *Deklaracio de Homaj Rajtoj*; tiujn provizis la UEA Oficejo en Novjorko.

NIA *Novajletero* #8

## NEVADA

Laŭ invito de NICE (Nevada Inform-Centro pri Esperanto) kaj ties ĉefaj kunlaborantoj Natalie Sera, Chris Nelson, kaj d-ro Steven Tchudi, publikan paroladon ĉe la Universitato de Nevada en Reno prezentis internacidevena grupo el la kalifornia golfa regiono, konsistanta el Ionel Onet, Don Harlow, kaj prof-ino Ĉien Minĉi je sabato la 13a de oktobro.

## NEW YORK

Dum septembro vizitis Ove Kjönsvik, juna norvega esperantisto el Berlino, Germanio. Li interesiĝis pri komputiloj, kaj dum sia longa veturado trans Usono li aĉetis diversajn komputilajn kaj elektronikajn. Ove ŝatis la etnajn manĝaĵojn de Usono, precipe la hindan.

Raportis Thomas Eccardt en *Novjorka Prismo*

Märtha Andréasson, ano de la Esperanto-Alianco de Gotenburgo, Svedio, vizitis Novjorkon de la 22a de septembro ĝis la 5a de oktobro. Ŝi alvenis kun proksimume 30

svedoj, anoj de UNA/Svedio, por partopreni specialan programon ĉe UN en Novjorko kaj ĉe la Monda Banko en Vaŝingtono, DC. Märtha du fojojn vizitis la UEA-oficejon kie ŝi konatiĝis kun Rochelle Grossman kaj Renata Kaczmarska. Rochelle kaj Märtha kune vizitis Rockefeller-Centron, Broadway, la Hotelon Waldorf Astoria kaj Lincoln-Centron, kie ili ĉeestis belan koncerton.

Raportis Rochelle Grossman en *Novjorka Prismo*

## NORTH CAROLINA

Dek-tri studentoj el Norda Karolinio kaj Florido, pliparte instruistoj, finis la unuan intensan dusemajnan Esperanto-kurson ĉe Gaston-Kolegio dum la lastaj du semajnoj de junio. Ĉiu studento ricevis Certigilon de Gaston-Kolegio, deklarantan, ke tiu gajnis ses kreditunuojn pro kompletigo de Esperanto-kurso aprobata de la Instanco pri Publika Instruado de Norda Karolinio. Estontece, en ĉiu somero Gaston-Kolegio, kunlabore kun la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, proponos intensajn komencgradajn, mezgradajn kaj superajn Esperanto-kursojn, je kiuj oni povas ricevi renovigajn kreditojn por instruistoj.

El la Bulteno de la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, Sep. 1990

## TEXAS

La 3an de novembro, pro la renovigo de la komerca areo de la urbo Harlingen, la lokaj esperantistoj starigis Esperanto-budon por montri multajn allogajn aferojn pri la lingvo. Oni disdonis almenaŭ 250 faldfoliojn kaj libromarkojn al ĉiuj, kiuj haltis kaj parolis. Al multaj infanoj oni donis \$1,000,000-ludmonbiletojn.

Raportis Prenda Cook

## WASHINGTON

La 24an de julio, dum la "Goodwill Games", Shahin McKinnie kaj Jonathan Pool parolis pri Esperanto dum 20 minutoj je publika radio. Poste, kelkaj personoj komencis lerni la lingvon.

Raportis Shahin McKinnie

Dum la 26-28a de oktobro NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) okazis. Partoprenis pli ol 60 esperantistoj el Kanado, Oregonio, Ilinojso, Kalifornio kaj Vaŝingtonio. Ruth Culbert prezentis sian teatraĵon ("La Juvelo"). Ĝi allogis multan atenton. Poste, Bertil Weiner instruis kelkajn popoldancojn. Ĉiuj ĝuis la aferon.

Raportis Shahin McKinnie

# EL LA CENTRA OFICEJO

## Retro-Perspektive

Ekzistas bela kutimo, ke fine de la jaro la homoj retrorigardas la finiĝantan jaron kaj antaŭrigardas la komenciĝantan, tirante konkludojn kaj farante planojn. En tiu parto de la jaro, statistiko estas la plej uzata parto de la matematiko, sed nur ciferoj, nombroj, sen ia interpretado estas sekaj, vakuaj kaj tedaj.

ELNA (denove la esperantistoj ŝajnas esti apartaj) havas du jarfinojn: la fiskan (fine de majo) kaj la kalendaran (fine de decembro). Sekve ankaŭ la statistikoj de ELNA baziĝas sur tiuj ĉi datoj, kiel referencpunktoj. Se pri la kresko de la membraro de ELNA, ni jam fieris, kaj ne senkiale, pri la komerca aspekto de nia—senprofitcela—organizo, indas nun, fine de la kalendarajaro, menciigi kelkajn datojn kaj informojn, al kiuj mi aldonos proprajn konkludojn.

La ĉefa negoca parto de ELNA konsistas el la Libroservo, kiu disvendas ĉirkaŭ 1000 varojn (librojn, kasedojn, diskojn [ankaŭ kompaktnajn], ĉemizojn, ĉapelojn, insignojn, memgluaĵojn, vidbendojn kaj aliajn (pri)esperantajn varojn). Kiel supozite, la plej vendataj varoj, el la supre menciitaj, estas la libroj. Ne ĉiuspecaj, sed precipe lernolibroj. Oni povas klarigi tion per la fakto, ke, kompare kun aliaj landoj, en Usono Esperanto estas malpli konata (por ne diri neglektata). Lastatempe, ŝajne, pli da personoj ekinteresiĝas pri tiu ĉi lingvo, kaj la ĉefa vojo konatiĝi kun la lingvo estas eklemi ĝin. Sekve, sur la pinto de la plej vendataj libroj en la fiskajaro 1989-90 estis la libro *Esperanto • Learning and Using the International Language* de David Richardson, la plej valora kontribuo al la Esperanta libraro venanta el Usono en la lastaj jar(dek)oj. Lernolibro sen vortaro (tiu enhavata de la libro sufiĉas nur por la libro mem) estus kvazaŭ festeno sen muziko. Sekve, la duan lokon okupas la vortaro de J.C. Wells—*Esperanto Dictionary*, kiu cetere bezonas ĝisdatigitan kaj kompletigitan version. Aliaj lernomaterialoj okupas la unuajn lokojn en la listo de la plej vendataj libroj de la Libroservo de ELNA (vidu la liston ĉe la fino). La sekva grupo de plej vendataj libroj estas la legolibroj, kaj ankaŭ tio

aspektas sencoplene: post eklernado, oni provas legi taŭgan literaturon por komencantoj. La beletra kaj la scienca literaturo ne sufiĉe bone vendiĝas (almenaŭ en Usono), kaj el tio oni povas konkludi, ke en tiu ĉi mondoparto Esperanto restas (eble tro longe) nura hobbio.

Sendube, la unua celo de Esperanto estas helpi komunikadon inter personoj de malsamaj landoj, kulturoj, lingvoj. Sed komunikado estas iom pli ol amikeca interŝanĝo de leteroj, poŝtkartoj kaj eventualaj revuetoj. Eĉ pli bone ni povas koni popolon, nacion, landon per ties literaturo, arto, politiko, scienco. Sekve, legi tiaspecajn eldonaĵojn helpas nin pli bone koni la mondon kaj ankaŭ plibonigi nian lingvon. Ankaŭ, la Esperanta parolantaro kreis propran kulturon, kaj la unuaj konatiĝantaj kun tiu kulturo devas esti la esperantistoj mem. Rigardante la liston de la plej vendataj libroj pere de nia libroservo, mi konstatis, ke nia klientaro malatentas tro la Esperantan kulturon, eble pro la fakto, ke ankoraŭ tro ofte oni povas aŭdi asertojn kiel tiuj ĉi: “lingvo artefarita ne povas havi kulturon” aŭ “Esperanta kulturo ne povas ekzisti”.

Cu ni miru, ke la plej vendataj kasedoj estas lernaj? La dunivela kurso *Jen nia mondo* okupas altan lokon en la hierarkio de la vendataĵoj. Ne mirinde, se enkalkuli ĝian popularecon. Mi tamen esperas, ke ankaŭ la muzikaj kasedoj vendiĝos, post nelonge, pli bone: ankaŭ ili estas parto de nia kulturo.

Nekredeble bone vendiĝas la Esperantaj propagandiloj: insignoj, ĉemizoj, flagoj, memgluaĵoj, faldfolioj. Sed, bedaŭrinde, ne ili estas tiuj, kiuj enspezigas monon. Ili estas nur montrilo pri nia ekzisto, kio denove rememorigas min pri ia hobinivela esperantismo, sendube, ne entute senvalora, kaj ankaŭ pri la fakto, ke en Usono la esperantista movado estas ie ĉe sia komenco.

La dua komerca “fako” de ELNA estas la Abonservo. Same kiel ĉe la kazo de la Libroservo, ELNA ne povas peri/vendi ĉiujn eldonaĵojn. Por la finiĝanta jaro, ELNA peris preskaŭ 20 Esperanto-periodaĵojn, kaj tio ne estas granda nombro, se enkalkuli, ke tra la mondo aperas pli ol cent tiaj eldonaĵoj (sen la lokaj bultenoj). Kaj same, kiel ĉe libroj, ankaŭ

ĉe periodaĵoj ni povas krei liston laŭ la abonkvanto (vidu ĝin ĉe la fino).

La esperantistoj ŝatas esti informitaj pri okazaĵoj en la tuta mondo, kaj tio videblas el la fakto, ke la plej abonata gazeto por la kuranta jaro estis *Monato*. Kaj ili (la esperantistoj) ankaŭ volas scii, kio okazas en la “verda” mondo, kaj sekve *Heroldo de Esperanto* okupas ĉefan lokon inter la plej legataj gazetoj. En teĥnokrata mondo, literaturaj, filozofiaj, religiaj gazetoj ne havas grandan sukceson. Bedaŭrinde, ĉar *La Gazeto kaj Literatura Foiro* estas inter niaj plej valoraj periodaĵoj. Ni nur esperu, ke la eldonrĥtimo de *Scienca Revuo*, *Fonto* kaj *Budapeŝta Informilo* pliboniĝos en la venonta jaro kaj ke la nove perataj de ni periodaĵoj (menciinda estas precipe *La Brita Esperantisto*) vekos sufiĉe da intereso, kiu, post unu jaro, videblos en simila statistiko.

Sendube, la usona E-merkato ne limiĝas je la servoj de ELNA. Librovendistoj/ejoj havigas al interesatoj aliajn E-librojn (precipe lernajn), dum perantoj provas kreskigi la nordamerikan legantaron de E-periodaĵoj. Tiuj “aliaj” (vendistoj kaj perantoj) ne nur konkurencas niajn servojn (konkurenco alportas evoluon, ĉu ne?), sed ankaŭ kompletigas ilin: kiel sciate, ni ne povas disvendi kaj peri ĉiujn E-eldonaĵojn. Se tiu konkurenco-kompletigo okazas laŭ la leĝoj de respekto kaj justo, ĝi povas nur gajni la usonan esperantistaron.

Indas ankaŭ rigardi estontecen. Kio okazos en la nova jaro, kaj en la sekvontaj, se enkalkuli la senvaloriĝon de la usona dolaro kaj la politikajn kaj sociajn ŝanĝojn en la mondo, kaj precipe en la tiel nomata komunisma?

La aĉetantoj de libroj kaj la abonantoj de periodaĵoj Esperantaj konstatis, ne senbedaŭre, ke la prezoj kreskas senĉese, kaj la unua demando estas: ĝis kie? Nu, sendube la esperantistaro ne povas ŝanĝi la mondan financan situacion, sed almenaŭ problemojn en sia propra “mondo” ĝi povas ŝanĝi. Pro la fakto, ke la libro-merkato Esperanta ne funkcias sufiĉe glate, la prezoj de la Esperantaj libroj estas ĝenerale tro altaj (sur la unua loko rilate altajn prezojn ŝajnas esti *Eldonejo Iltis*). Se niaj libroj vendiĝus pli bone, la prezoj

por unuoj estus malpli grandaj aŭ malpli rapide kreskantaj. Plie, ĝuste el tiu mondoparto kie estas la plejparto de la esperantistoj, oni ne povas sendi monon eksterlanden, kaj ĝuste tie okazas ŝanĝoj, kiuj, almenaŭ momente, ne plifaciligas la aferojn. La situacio ripetigas ankaŭ koncerne periodaĵojn. Multaj el niaj E-periodaĵoj venantaj el Orienta Eŭropo spertas malfacilaĵojn, precipe financajn (*Budapeŝta Informilo*, *Hungara Vivo*, *Pola Esperantisto*, *Starto*, k.a.), dum aliaj entute malaperis (*Voĉo de Handikapuloj*, *Fokuso*). Cetere, ankaŭ *Bulgara Esperantisto* kaj *Jugoslavia Stelo* spertas malfacilaĵojn. Subtenitaj de ŝtato aŭ/kaj aliaj politikaj aŭ kulturaj organizoj, la koncernaj periodaĵoj trovas sin tute senhelpaj kaj kun nebula estonteco. Malfeliĉa perspektivo. Tamen, almenaŭ por kelkaj el ili ŝancoj ne mankas, kaj helpo povas veni ankaŭ de ni, se ni daŭre abonos kaj abonigos niajn ŝatatajn gazetojn. Librojn bezonas ankaŭ niaj samideanoj en landoj kun financaj problemoj, kaj—eĉ se honte—ili akceptos niajn/viajn donacojn. La helpo estas multobla: la libromarkato funkcias, kaj la

eldoninto kaj vendanto regajnas la elspezitan monon, dum la eldonaĵo atingas sian legant(ar)on, laŭ sia celo. Mi mem plu vidas kreskon de prezoj en Esperantio, sed ankaŭ kreskon de intereso. En niaj manoj kuŝas la povo "stimuli" unu aŭ alian.

#### La plej vendataj 10 libroj en la fiska jaro 1990

1. *Esperanto • Learning and Using the International Language* (David Richardson)
2. *Esperanto Dictionary* (J. C. Wells)
3. *Jen Nia Mondo I* (J. C. Wells)
4. *Jen Nia Mondo II* (J. C. Wells k.a.)
5. *The Esperanto Teacher* (Mason Stuttard)
6. *English-Esperanto Dictionary*
7. *A Key to Esperanto*
8. *Teach Yourself Esperanto* (J. Cresswell & J. Hartley)
9. *A Practical Course in Esperanto* (Ferenc Szilagyi)
10. *Esperanto-English Dictionary* (Montague C. Butler)

#### La plej vendataj 5 kasedoj en la fiska jaro 1990

1. *Jen Nia Mondo I*
2. *Jen Nia Mondo II*
3. *Teach Yourself Esperanto*
4. *Esperanto Pronunciation Cassette*
5. *Saluton!—Esperanto aŭtodidakte*

#### Listo de perataj gazetoj laŭ la abonkvanto en la kalendara jaro 1990 (mankas eldonaĵoj de UEA)

1. *Monato*
2. *El Popola Ĉinio*
3. *Heroldo de Esperanto*
4. *Fokuso*
5. *Juna Amiko*
6. *La Jaro* (de *Monato*)
7. *Scienca Revuo*
8. *Hungara Vivo*
9. *Lingva*
10. *Fonto*
11. *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj*
12. *La Kancerkliniko*
13. *Budapeŝta Informilo*
14. *Bulgara Esperantisto*
15. *La Gazeto*
16. *Literatura Foiro*
17. *Simpozio*
18. *Oomoto*

—Ionel Onet

## LANGUAGE IN THE NEWS

[In 1963, *Newsweek* reported that a Superintendent of Public Schools in Arkansas turned away a group of parents who wanted to introduce foreign language teaching with the words: "If English was good enough for Jesus Christ, it should be good enough for you." The times they are a-changin'...]

The Board of Education in Arizona has unanimously approved a new regulation requiring all public schools to teach a foreign language to all students in grades 1 to 8 by 1999. ... The President of the Board declared, "If we as a nation are going to regain our economic preeminence in the world marketplace, we'd better start learning other nations' languages." ... The languages may be modern, classical, or American Indian, and a variety of methodologies may be employed.

[*Glastonbury News*, quoted by *The Newsletter of the Illinois Foreign Language Teachers Assn.*, Fall, 1990; sent by Prof. Ron Glossop]

[Unrelated to the above, it says here.]

Arizona's law which would have made English the official language of the state was declared unconstitutional by the U.S. District Court. Judge Paul Rosenblatt ruled against it on free speech grounds, and Governor Rose Mofford, the only person with legal standing to appeal, said she would let the ruling stand. ... Given the weight of precedent in U.S. law, it is possible that the Arizona decision will have implications for other states that have enacted or are considering laws to establish English as

the official language.

[*The Newsletter of the Illinois Foreign Language Teachers Assn.*, Fall, 1990; sent by Prof. Ron Glossop]

[\$210/hour? How much does Teach Yourself Esperanto cost these days?]

American Telephone & Telegraph has extended to consumers its worldwide telephone interpretation service that gives callers 24-hour-a-day access to translators in about 140 languages.

"We're responding to requests to make this available to those outside our subscription base service for institutions," said Jeff Munks, director of marketing and sales for Language Line Services. "This addresses a very real need. People have been eternally frustrated because of a lack of a service like this."

The service costs \$3.50 for each minute and can be billed to major credit cards, the company said.

[Los Angeles, CA, *Times*, Oct. 31, 1990; sent by Margaret Zarchy]

[They're feeling their oats...]

The government of united Germany intends to demand from the European Community, and especially from its commission (its quasi-government) in Brussels, wider and more equal use of German, not just of English and French, as often happens now despite the fact that in the European Community all languages of the member states are (theoretically) equal. The German government will no longer accept

the argument that wider use of German is not possible because of high costs, and complains that disadvantages for German office workers, and especially for German businessmen and industry, develop from the use of only two office languages.

[*Monato*, Nov. 1990]

[Does this sound familiar?]

A professor at San Jose State University in California has made a remarkable discovery.

While studying reasons why male students do better at math and computer science than female students, she noticed that, in fact, female students of Asian origin do better than male students of Caucasian origin. After studying this phenomenon, she concluded that the reason Asian students do better than Caucasian students at math is that Western languages, such as English, contain non-consequential words for some numbers, such as "eleven," "twelve," and "twenty," thus making the learning of mathematical basics a non-trivial task. Most Asian languages, however, use constructions that facilitate early math learning, such as "ten-one" for "eleven," "ten-two" for "twelve," and "two-ten" for "twenty." Support for a cultural-linguistic source of such an advantage, rather than a genetic one, comes from the fact that third and fourth generation Americans of Asian descent usually don't enjoy the same advantage.

[Reported on KCBS radio station, San Francisco, Nov. 26, 1990]

de Robert Swenson

[Robert Swenson estas longtempa esperantisto kaj ELNAano el la ŝtato Wisconsin. Siatempe, li servis kiel Estrarano de ELNA. La jenan artikolon li aperigis en Semanto, la dumonata bulteno de la Esperanto-Societo de Michigan.]

La tria Ĉiujara Mezlanda Esperanto-Konferenco okazis en Milwaukee, Wisconsin, dum la lasta semajno de junio, 1990. Planado por la evento komenciĝis antaŭ pli ol jaro, kiam kelkaj membroj de la Esperanto-Societo de Wisconsin kunvenis en Lago Genevo, Wisconsin, kun Sherry Wells de la Esperanto-Societo de Michigan. Dum tiu kunveno ni interkonsentis aranĝi konferencon okazontan ĉe la Universitato de Wisconsin ĉe Milwaukee (UWM), kie Pierre Ullman, membro de la Milwaukee-grupo, estas profesoro.

La formato de la konferenco similis al tiu de la konferenco kiu okazis en Kalamazoo, Michigan, en 1988: kvin tagoj de intensaj kursoj, kaj poste dutaga konferenco.

En julio, 1989, ni kontaktis la Loĝadan Fakon de la Universitato kaj informis ilin pri la datoj kiam ni volos kunveni. Profesoro Ullman sukcesis aranĝi subtenon de nia konferenco fare de la Fakultato de la Hispana kaj la Portugala. Tiu subteno donis al ni uzon de granda klasĉambro senkoste por niaj aferoj, kaj permesis al ni malpliigi la kotizon de la aferoj.

Ni decidis okazigi samtempe du kursojn; unu por komencantoj kaj unu por progresintoj. Pierre Ullman konsentis instrui la komencgradan kurson, kaj ni varbis Profesoron Leszek (Les) Kordylewski de la Universitato de Chicago por instrui la kurson de la progresintoj.

En januaro, 1990, ni akiris de ELNA liston kun ĉirkaŭ 300 nomoj de ELNA-membroj kaj informpintoj en la ŝtatoj de la "Mezlando" al kiuj ni sendis anoncojn pri la kursoj kaj konferenco. Ni resendis la anoncojn fine de aprilo. Kelkaj personoj en la urboj Chicago, Milwaukee kaj Detroit ankaŭ disdonis la anoncojn.

Komence, aliĝiloj alvenis malrapide, sed kiel ni esperis, la nombro pligrandiĝis kiam la dato de la komenco de la kursoj

pliproksimiĝis. Je la 17a de junio, 15 personoj aliĝis al la kursoj, kaj 25 aliĝis al la konferenco. Ni opiniis la nombron sufiĉa.

Lastmomentaj aliĝiloj daŭris alveni eĉ ĝis la fino de la semajno de la konferenco mem! Kiam komenciĝis la kursoj ĉeestis 20 studentoj; 9 progresintoj; kaj 11 komencantoj el kiuj du anoncis sin post la komenco de la kursoj. La studentoj venis el la ŝtatoj Wisconsin, Illinois, Missouri, Michigan kaj Indiana.

La komenca klaso uzis la libron *Esperanto • Learning and Using the International Language* de Richardson. La progresinta klaso uzis la libron *Paŝoj al Plena Posedo* de Auld, kaj ankaŭ materialon kiun kunportis Les Kordylewski.

La kursoj daŭris ses horojn ĉiutage. La progresintoj eksperimentis pri diversaj horoj en la posttagmezo kaj vespero. La komencantoj regule kunvenis tri horojn matene, kaj tri horojn posttagmeze.

La studentoj ofte kunvenis post kurs-horoj. Unu vesperon grupo da studentoj vespermanĝis kun S-ro Kordylewski en bonega pola restoracio kie Les povis prezenti la polajn manĝaĵojn en Esperanto.

Dum la semajno, kiel parto de la studo, la progresintoj havis kelkajn varmegajn diskutojn pri debateblaj temoj. Unufoje ambaŭ klasoj kunvenis por kanti popolkantojn en Esperanto kiujn akompanis klavare S-ro John Prince kies kutima instrumento estas preĝeja orgeno.

Vendredon posttagmeze la cetero de la partoprenantoj de la konferenco komencis alveni. Je la fino de la kursoj, la studentoj ricevis atestojn de siaj plenumoj. La tagordo de la konferenco vendredon vespere inkluzivis prelegon de Profesoro Ron Glossop kun la temo "Eduko por Infanoj", kaj amuza prelego de Armin Doneis kun la titolo "Memoraĵoj de Fuŝbakita Lingvisto".

Ĉirkaŭ 40 homoj ĉeestis la eventojn de la konferenco, inkluzive tiujn de ŝtatoj antaŭe menciitaj, kaj ankaŭ tiujn de Teksaso kaj Florido, kaj la landoj Pollando kaj Ĉinio. La partoprenanto de Ĉinio estis Profesoro Jang Ren, kiu vizitas la Universitaton de Wisconsin ĉe Milwaukee de la Universitato de Harbin, Ĉinio. Bonega esperantisto, S-ro Jang prelegis pri siaj spertoj pri Esperanto en

Ĉinio kie li laboris por la bone konata ĵurnalo *El Popola Ĉinio*. Fakte, lin petis la redaktoroj de *El Popola Ĉinio* fari raporton pri nia konferenco por la ĵurnalo.

Sabaton matene, krom la prelego de Profesoro Jang, Sherry Wells kondukis kunsidon pri publikigo kaj reklamado—"kiel ekmovigi la movadon". Multajn bonajn ideojn ŝi kaj aliaj prezentis. Oni intervjuis Sherry-on en loka radio-programo dum la semajno, kaj ŝi ankaŭ sukcesis aperigi artikolon pri la konferenco en loka gazeto.

Sabaton posttagmeze ni ekskursis per ŝipo tra la haveno de Milwaukee. Tiu ekskurso donis al la eksterurbaj vizitantoj ŝancon vidi la urbon desur Lago Michigan, kaj ankaŭ donis al la partoprenantoj okazon konversacii en Esperanto.

Sabaton vespere ni bankedis en ĉina restoracio apud la universitato. Prelegis post la bankedo Les Kordylewski, kies temo estis "La Respondeco de la Usonaj Esperantistoj." Dirite tre mallonge, tiu respondeco estas la neceso publikigi tra la mondo la fakton, ke kreskas intereso pri Esperanto eĉ en ĉi tiu lando kie regas la angla lingvo. Tiel ni povas kuraĝigi esperantistojn en aliaj landoj daŭrigi siajn klopodojn okazigi oficialan uzadon de Esperanto en internaciaj medioj.

La lasta afero de la konferenco dimanĉon matene estis Diservo kiu uzis esperantan tradukon de la episkopala rito "Matenpreĝo". La Diservon ĉeestis 25 personoj. Dum la Diservo ni kantis tri bone konatajn himnojn en Esperanto, akompanataj plane de Pastro Julian Hills, Profesoro de Teologio en la Universitato de Marquette. Pastro Hills estas lingvisto kiu lernis Esperanto sufiĉe dum kelkaj semajnoj por gvidi la Diservon preskaŭ perfekte. Je la fino de la Diservo li akompanis la grupon kanti "La Esperanto".

Ĉi tiuj kursoj kaj konferenco donis al la partoprenantoj okazon plibonigi sian Esperanton sen bezono vojaĝi grandan distancon kaj sen neceso resti longtempe for de la laboro kaj aliaj respondecoj. La organizo de la afero estis bona projekto por nia loka grupo. Ni esperas, ke la Mezlandaj Esperantaj Konferencoj daŭros, kaj ni kuraĝigas esperantistojn en aliaj regionoj komenci similajn aferojn.

---

## EGI Does It Again!

by Cathy Schulze

"Now I know that Esperanto works. People really speak the language. It makes me want to study harder." That was the reaction of David Lines of West Jordan, Utah, my postal student who had finished only five lessons. David's reaction bears out the advice of Humphrey Tonkin, former UEA president: Esperanto gatherings should be not only a place for meeting friends but, upon leaving, all should feel that they have learned something valuable.

This year's 10th EGI (Esperanto-Grupo Intermontara) conference at the Carlson Conference Center of Westminster College in Salt Lake City, began on the evening of Friday September 14 with a sumptuous buffet and lots of socializing as everyone arrived. I was delighted to meet four of my postal students for the first time: Mary Ditson of Orem, Dr. Paul Merrill of Brigham Young University, David Lines of West Jordan, all of Utah, and Ryon Brame of Boulder, Colorado.

Steve Price-Zacharias, Ph.D., Salt Lake City, led off Saturday morning with a discussion of Zamenhof's Homaranismo which calls for: 1) Absolute equality of all people; 2) Justice and mutual respect among peoples of all races and religions; 3) Each person must be free to follow his or her own personal theology; 4) Each person is free to speak whatever language he or she wishes to at home; 5) When meeting people whose home language is different, a neutral tongue should be used; and on through 10) There should be no conflict between science and religion.

Then, in best story-teller tradition, he narrated Wendy Heller's *Lydia, Daughter of Esperanto*, followed by lively discussion about this Esperanto pioneer.

Charles Hall, UEA delegate for Salt Lake City, lectured on the theme: "Use of Esperanto in Genealogical Research in Eastern Europe." With the help of Espe-

rantists he spent four years researching a vast number of genealogies. In the absence of David Barron (president) and Diane Giannini (vice-president), Mr. Hall presided at the conference.

Mr. Hall introduced Dr. Robert Blair, Foreign Language Department, Brigham Young University, who demonstrated the Lozanov method (suggestopedia) of language teaching, which has been used for years at BYU. Dr. Blair began by telling the parable of The Prodigal Son in Esperanto. Using that theme, he selected four people to role-play, some of them beginners. The characters were: Dr. Paul Merrill, the son; Nancy Hutcheon, his girl-friend; Cathy Schulze, the mother; Charles Hall, the father. They were to improvise dialogue. When the beginners groped for a word, Dr. Blair whispered the needed word or phrase. The second group, playing the same roles, were Ryon Brame, Mary Ditson, Elizabeth Hicken and Art Fonseca. As father, Art gave it all a modern twist when he told his son that forgiveness depended upon his learning Esperanto.

BYU has a strong foreign language requirement. Dr. Blair's compassion for students who find foreign language study difficult prompts him to explore many techniques. Much of the success of the BYU program is due to the many innovations that he has introduced. It led him to include Esperanto many years ago as preparation for learning ethnic languages.

The traditional banquet was excellent, in a lovely flower-decorated setting. Tribute was paid to Roan Orloff Stone, the founder of EGI, and her friends sent her notes of good wishes from the conference. Now blind, and living with a son in Texas, Roan misses contact with Esperantists. She welcomes cassette letters from friends.

John Mathews led a discussion of techniques for working with interna-

tional organizations such as Rotary, Kiwanis and others. A brisk discussion generated many ideas. Art Fonseca presented a fascinating account of the part Esperanto played in bringing him from Lisbon to the United States. With the help of a young San Francisco Esperantist, he pursued university studies in San Francisco; this led to a career as teacher of Spanish in Santa Rosa High School. The complications he had to overcome in getting to the United States would have daunted a less courageous person.

Sunday morning, Dr. Steve Price-Zacharias returned to speak on "An Expansion on the Principles of Dr. Zamenhof to a 21st Century Language." For his doctoral dissertation at London University, Dr. Price-Zacharias planned a language, Abhamian, which he developed from 51 existing languages as well as seven ancient ones. Its vocabulary comes from various languages of the Semitic, Slavic, Teutonic and Finno-Ugric families, as well as Italian, Korean, Armenian, Chinese, German, Sign Language and Swahili.

Dr. Price-Zacharias provided several papers describing the language structure and, as may be expected, generated many questions. He concluded by saying that the project got him his doctorate, but that he wants to dedicate himself to helping Esperanto.

Lusi Harmon concluded the program with "World Travel Using Esperanto." She showed slides of the ELNA convention in Mexico City and the UEA convention in Cuba.

Yellowstone National Park may be the locale for the 1991 EGI conference. Richard Ranc, who works there, answered questions on the available facilities and will explore further.

Following an excellent Sunday brunch we all said our goodbyes and were off for our homes in Montana, Utah, Colorado, Arizona and California.



## SUPERAN KURSON PROPONIS ESPERANTO-SOCIETO DE VAŜINGTONO

de Joan Gildemeister kaj Martha Flores

Ĉu vi volas plibonigi vian parolkapablon aŭ/kaj rafini vian stilon? Memstudo ne ĉiam servas, sed kion elekti?

Do, organizu superan kurseton kaj eltrovu la riĉajn talentojn de eminentaj esperantistoj de via regiono. Lastatempe, tion faris komitatanoj de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono kiam ili aranĝis du tagojn de studado ĉe hotelo apud la Universitato George Washington, 20-23an de septembro 1990.

Sabaton matene Charles Power, antaŭa ELNA Estrarano, antaŭa oficisto de UEA en Nederlando kaj orienta Eŭropo, kaj tradukisto de sciencfikcio, prelegis pri la gramatiko. Li klarigis la ĝustan uzadon de participoj, kaj la diferencojn inter verboj de ago kaj verboj de intenco. Poste, E. James Lieberman, M. D., Estrarano de ELNA kaj konata sciencisto kaj verkisto, ilustris, kiel li tradukas kompleksan poemon kun diversaj niveloj de signifo: la aŭdebla, la kaŝita, la neevidentita, kaj la neesprimebla. Charles Power daŭrigante invitis la ĉeestantojn traduki verkon en loka dialekto, kies tuto estus komprenebla nur al

tiuj kiuj sciis pri la lokaj kulturo kaj moroj. Sekvante, Joan Gildemeister proponis kelkajn rimarkigojn pri la ĉeĥa literaturo. Ŝi proponis, ke en la verkoj de Piĉ, ekzemple, oni supozas, ke la aŭtoro uzis Esperanton ne nur kiel lingvon de libereco por la seksaj obsedoj kaj rememoroj de la vivo antaŭ la dua mondmilito. Li eble ankaŭ uzis Esperanton kun siaj neologismoj kiel kodon, serĉante solvon al la ŝlosita medio tie. La grupo diskutis la rolon de la Esperanta verkisto en la restrukturado de orienta Eŭropo.

Ralph Dumain, bibliotekisto kaj konata kritikisto de la Esperanta literaturo, kontribuis informplenan prelegon pri la historio de la Esperanta poezio, kun analizo de diversaj epokoj kaj stiloj. Li legis specimenojn el la plej elstaraj aŭtoroj kiel Kalocsay, Auld kaj Szathmari, kaj disdonis bibliografion de la plej gravaj gvidlibroj pri Esperanta literaturo.

Je la komenco de la dua tago d-ro Jack Birmingham, Profesoro de la Franca Lingvo en Riĉmondo, legis ĉerpajojn el la Biblio, kaj la bahaano Charles Donoghue

proponis preĝon. Post la Diservo s-ro Donoghue ludis la sintezilon, kaj la grupo kantis kelkajn kantojn elektitajn de Rita Guzaŭskis. Poste, Charles Power daŭrigis la diskuton pri tradukado. Poste, lia edzino Daniela, sciencisto el Bulgario kiu alvenis lastatempe en Usonon, parolis pri Bulgario kaj arkitekturo. Ŝi distris la partoprenantojn per anekdotoj kaj faktoj pri la nuna kaj pasinta vivo en Bulgario. Ŝi montris bildojn de sia naskiĝvilaĝo kaj la nuna hejmo de siaj gepatroj.

La semajnfino fermiĝis kun anoncoj pri la venontaj vagadoj al Riĉmondo kaj Norda Karolinio. La sukcesplenajn okazaĵojn organizis Martha Flores kun la helpo de Pilar Solis, Rita Guzaŭskis kaj Phil Chenoweth. Ĉeestis s-roj Goodman kaj Cachip el Baltimoro, Chuck Mays, John Thomas, Gary Grady, Tod Martin, kaj la ges-roj Donoghue el Norda Karolinio, Jack Birmingham el Riĉmondo, kaj kelkaj el la lokaj esperantistoj. Pro malsano mankis la ges-roj Goldman, kaj pro la Mezorianta Krizo mankis Majoro Mark Haskell.

### NOREK '90

de Arlyn Kerr

Dum la lasta semajnfino de oktobro okazis la naŭa NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Kongreso), en Fort Worden Ŝtata Parko en la bela urbo de Port Townsend, Vaŝingtonio. Partoprenis 62 samideanoj de Vaŝingtonio, Oregonio, Kalifornio, Brita Kolombio, kaj Alberto. Ekde la gaja interkona vespero vendredon ĝis la bela mondvida ceremonio, gvidata de Jim Deer, dimanĉon matene, la programo estis plena kaj interesa. Prelegis Allan Simon pri "La lingva situacio en Kebekio"; Bill Harmon pri la Universala Kongreso en Kubo; Liland Ros' pri "La ĉinuka piĝino—la Esperanto de praNOREKujo"; Dori Vallon-Wheeler pri sia ses-monata instruado en Ĉinio; kaj Jim Deer pri siaj vizitoj al Sovetio. Bob Simmonds gvidis dudek kuraĝulojn (kontraŭ ventego) en promonado tra Port Townsend. Maria Hopkins instruis komencantojn per la Cseh-metodo. Ĉiuj ĝuegis la originalan misteran dramon, "La Juvelo", fare de Ruth Culbert; ok geaktoroj perfekte ludis la rolojn. Post la teatraĵo okazis festo kun popoldancoj (gvidataj de Bertl Werny kaj Greg Posick), ludoj, kaj amuzaj skeĉoj. La kunveno estis granda sukceso, kaj ĉiuj ĝoje anticipas la venontan.

### KIAL KAJ KIEL KUNLABORI EN LA KAMPO DE SCIENCO KAJ TEKNOLOGIO?

de R. Kent Jones, ELNA Komisiito pri Scienco kaj Teknologio

#### Kial Kunlabori

Informo pri scienco kaj teknologio (S + T) abundas en la lingvoj angla, franca, germana, japana, kaj rusa. Do, kial klopodi meti tian informon en Esperanton? Ĉar Esperanto kapablas helpi plibonigi la vivkondiĉojn en la tria mondo, loĝloko por pli ol 60% de la homaro. Jen la plej grava celo por nia komisiito pri S + T.

